# La kvara KKPS – ne maltrafu!

Se vi ankoraŭ ne aĉetis kalendaron ĉi-jare, tuj kuru al vendejo kaj aĉetu la plej belan kaj pompan, ĉar vi havas gravajn datojn por marki per neviŝebla skribilo:
**vendredo la 30-a de oktobro ĝis dimanĉo la 1-a de novembro 2015.**
Je tiuj tagoj okazos la Klaĉ-Kultura Postsomera Semajnfino, en la sudorienta pinto de Nederlando: Heerlen.



En luksa vilao en la centro ni loĝos denove kun junuloj kaj maljunuloj, sed ĉi-foje kun integrita programo laŭ la temo "Kune". Krom la tradiciaj halovina balo, trinkejo kaj kursoj okazos ekskursoj en la montetaro, bierfarada ateliero kaj diversaj unikaj prelegoj.

## Kotizoj:

| | Benelukso | Okcidenta Eŭropo | Resto |
|---|---|---|---|
| 30+ | €75 | €65 | €55 |
| 20-29 | €65 | €55 | €45 |
| 4-19 | €55 | €45 | €35 |
| 3- | €10 | €10 | €10 |


Aliĝoj post septembro pagas €10 pli, membroj de NEJ kaj aliaj landaj asocioj pagas €10 malpli.



*Mendu vian vojaĝon tuj!*

Eblas ĝiri la antaŭpagon de €15 al NEJ per nejk-r aŭ NL85 RABO 0147 9494 24.
Vi trovos aliĝilon, multajn informojn kaj belajn fotojn ĉe

http://kkps-klacxkunveno.wikidot.com



# Pos-Amiko

**Somero 2015, Numero 13**

*Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!*

**INDEKSO:**

1. Malferma letero al la estraro de UEA

2. Burunda prezidento rifuzas demisii antaŭ Afrika IJK

2. Esperantujo mobiliziĝas kontraŭ kazo de diskriminacio

3. Nova informservo en Esperantujo

3. Artikolo de leganto

3. Horoskopo

4. EVENTOJ

**KOLOFONO**

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

**http://kkps-klacxkunveno.wikidot.com/Pos-Amiko**

## Kara Estraro de UEA,

Per tiu ĉi letero mi kandidatiĝas por la posteno de Ĝenerala Direktoro de la Centra Oficejo de UEA. Mia nomo estas Koko Poso, profesia ĵurnalisto, ĉefredaktoro de la mondfama gazeto Pos-Amiko kaj ĉeforganizanto de la ĉiujara kultura simpozio KKPS. Kiel vi certe memoras, antaŭ preskaŭ unu jaro mi prezentiĝis al vi por la posteno de redaktoro de la Revuo Esperanto, kaj mi kredas kaj esperas, ke vi jam havis okazon bedaŭri vian tiaman decidon ne elekti min.

Antaŭnelonge mi legis en la Gazetaraj Komunikoj de UEA la komenton de nia prezidanto Mark Fettes: “Ni serĉas homon, kiu povas gardi la plej gravajn tradiciojn kaj trajtojn de UEA, sed ankaŭ kungvidi procezon de renovigo kaj modernigo." Tiu homo, aŭ pli bone koko, nur povas esti mi.

Mi listigas jen kelkajn proponojn en tiu ĉi direkto:

**En la kampo de informado:** renovigi la stilon de la nuntempaj informiloj, danke al kunlaboro kun la Grafika Komisiono de IEJ – Itala E-Junularo.

**En la kampo de eduko:** devigaj lingvaj testoj por rajti membriĝi en UEA.

**En la kampo de literaturo:** kombino de la nuna revuo Esperanto kun la Pos-Amiko sub titolo Pos-Amiko.

**En la kampo de asocio:** maldungi nunan estraron.

**En la kampo de financoj:** ŝanĝi la bonhavon de ĉiuj uea-kontoj al bitmono.

**Kaj fine por la oficejo mem:** aĉeti novan, pli malgrandan kafmaŝinon, ĉar Osmo ne plu trinkos kvar tasojn ĉiupaŭze.

*Koko Poso*

## Burunda prezidento rifuzas demisii antaŭ Afrika IJK

Pierre Nkurunziza, prezidento de Burundo ekde 2005, en aprilo kolerigis siajn samlandanojn per anonci sian triafojan kandidatiĝon por la prezidenteco, malgraŭ konstitucia maksimumo de du oficperiodoj. Kelkdeko da homoj mortis dum protestoj kontraŭ la anonco. En deklaro akirita de la Pos-Amiko prezidento Nkurunziza klarigas sian decidon:

"En 2010 mi aŭdis de TEJO, ke ili konsideras okazigi la IJK-on de 2014 en Afriko, eble en Burundo. Ekde tiam la ĉefa temo de mia dua oficperiodo estis sukcese inviti kaj organizi la unuan afrikan IJK-on en nia bela lando.

Pro fuŝoj en la flanko de TEJO la planoj pli kaj pli prokrastiĝis, unue al 2016, poste eĉ al 2017, kaj pro tio mi sentas min devigata plu ofici almenaŭ ĝis tiam por gvidi la unuan Afrikan IJK-on al sukcesa konkludo."

La Afrika Komisiono de TEJO esperas, ke post publikigo de tiu deklaro la ordo revenos al Burundo kaj la IJK 2017 estos same senĥaosa kiel la ĝisnunaj.

## Esperantujo mobiliziĝas kontraŭ kazo de diskriminacio

Esperantujo kiel kutime ne silentas antaŭ kazo de nepravigebla diskriminacio. Sen ajna valida kialo, la Estraro de UEA ekskludis la faman Esperantan kantiston Manŭel Rovere el ĉiuj roloj en la ĉi-jara UK kaj en la venontaj UK-oj.

Sekve de la multaj leteroj ricevitaj de tiu ĉi redakcio, Poso decidis enketi pri la situacio, kaj rekte pridemandis la Estraron de UEA, kiu tamen rifuzis respondi. Ili certe ne povus diri, ke ili ne konis detale pri la agado de Manŭel, ĉar ili ĉiam scias ĉion, kio al ili interesas, kaj kontrolas la sociajn forumojn en interreto pere de siaj adeptoj. Manŭel sendis al ili ankaŭ 43-paĝan dokumenton en kiu aperas la resumo de la vidadoj/aŭskultadoj de liaj videkantoj en interreto, la ŝatodeklaroj kaj la favoraj komentoj.

La ŝatantoj de la kantisto tuj ekis protestajn iniciatojn, kiel la vizaĝlibran paĝon "Ni volas la koncerton de Manŭel en la UK en Lille", kiu jam kolektis multajn ŝatojn kaj subtenajn komentojn. Ankaŭ la redakcio de "Egalecen", la ĉefa Esperanta blogo pri socia justeco, deklaris: "Tiu ĉi bedaŭrinda okazaĵo montras, kiel justa Esperantujo ankoraŭ estas revo. Ni volas esprimi nian soli-

darecon al Manŭel, kaj ni laboros por ke tiaj diskriminacioj kaj arbitraj subpremaj agoj ne plu okazu, ĉar ĉiuj ja rajtas havi voĉon".

## Nova informservo en Esperantujo

Inter la arbaro de novaĵservoj en Esperantujo, kiel Livera Folio, la KancerKliniko aŭ la gazetaraj komunikoj de UEA, finfine aperis iu akurata kaj fidinda fonto: ”Esperanto. WTF?” Ni aplaŭdas iliajn klopodojn kaj invitas al ĉiuj viziti post kkps-klaĉkunveno.wikidot.com ankaŭ www.esperanto.wtf.

## ESPERANTO estas sekto!

Sekreta spiono de FIKO (Federacio Internacia de Komplotistaj Orangutangoj) hieraŭ publikigis raporton kun pruvo pri sekteco de ESPERANTO (Eklezia Sekto por Promociigo de Energiaj Regantoj en Aĝo Nova Tutuniversa kaj Optimuma). Laŭ tiu spiono, tio estis la plej stranga afero kiun li tutvive vidis. Li renkontis la prezidantinon, tre maljunan avinon preskaŭ sendentan. Post iom da babilado, al li ŝi diris ekzakte "En eŝperantaj aranĝoj oni pagaŝ per ŝtela mono", tiam tute surpriziĝis la spiono kaj demandis "Kio? Ĉu vi ŝtelas monon???", kaj ŝi poste diris "Jeŝ, ŝtela estas nia mono, ĉar nia simbolo ankaŭ estas ŝtelo kaj ni emaŝ apogi la Verdan Ŝtelon. Ĉu vi havaŝ ŝteligeblan monon por doni al ni ?". Aŭdante tion nia kuraĝa spiono forfuĝis kaj promesas, ke iam oni kaptu tiun terurajn monŝtelistojn.

*Skribis Kévin Morel-Fourrier*

Ĉu ankaŭ vi volas aperi en la Pos-Amiko? Sendu vian artikolon antaŭ oktobro, kaj vi povas gajni 50 stelojn dum KKPS!

## LA HOROSKOPO

**Ŝafo:** Vi erare ricevos belegan poŝtkarton.

**Taŭro:** Ĉi-somere vi decidos manĝi nur glaciaĵojn.

**Ĝemeloj:** Vi malkovros, ke pli bonas kisi ol pisi.

**Kankro:** Vi komencos akvobatalon tuj antaŭ ekpluvos.

**Leono:** Vi aĉetos grandan pakaĵon da skribiloj, el kiuj neniu funkcios.

**Virgulino:** Post varmega semajno vi ne plu estos.

**Pesilo:** La suno bruligis vian Posamikon kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

**Skorpio:** Vi elpensos novan manieron por krei energion sed forgesos.

**Kévin Morel-Fourrier:** Vi elkalkulos, kiom da landoj vi neniam vizitos.

**Sagitario:** Vi iros sunbaniĝi sed pluvbaniĝos.

**Kaprikorno:** Via patrino tiom ŝatos vian repadon, ke ŝi pagos vian vojaĝon eksterlanden.

**Akvisto:** Ĉio estas via kulpo.

**Fiŝoj:** Vi erare missendos belegan poŝtkarton.